



Estrara Komunikado: EKO 2015-35 sendita el Lillo, la 31an de julio. EKO-UKO numero 8

Komitato vendrede – tri horoj apenaŭ sufiĉis

La Komitato aŭdis anoncon pri la nova Ĝenerala Direktoro de UEA, poste traktis la kvar forumajn raportojn kaj – foje kun etaj revertumoj – akceptis ilin. Sekvis diskutoj pri la nova rilato inter UEA kaj TEJO. La Komitato akceptis kun granda plimulto la unuan proponon, kiu konfirmis la principon, ke TEJO bezonas pro la eksteraj rilatoj prezenti sin kun karaktero de sendependa organizo. Tiucele estas proponata nova vortumo por Statuto de ILEI, kiu estos suplementita de Reglamento de TEJO por kovri tiujn punktojn, kiuj ne meritas eniri la statuton, sed kiujn tamen necesas fiksi. La tria el la trojko da dokumentoj estas interkonsento pri la rilatoj inter UEA kaj TEJO, kiuj kovros i.a. financajn kaj administrajn aspektojn de la kunekestado, sed kies tekston necesas ankoraŭ difini. La Komitato konstatis, ke la definitivigo de tiuj dokumentoj ja bezonas detalan studon rilate la postulojn de la nederlanda leĝo, ankaŭ fare de advokatoj. Dua propono, kiu permesas pluiron al tiuj konsultadoj kaj analizoj estis subtenata de la Komitato, sed kun iom malpli da voĉoj. En la diskuto estis projekciita unuminuta filmo pri la eksteraj rilatoj de TEJO inter junularaj organizoj eŭropaj kaj mondaj. Eble temas pri la unua fojo, kiam komitatanoj spektis filmon apoge al la diskutoj.

Plie la Komitato akceptis provizore la proponitan Regularon pri Konfliktsolvado, kiu revenos al la Komitato en Nitro por rediskuto surbaze de unujara sperto. Ĝi akceptis la buĝeton por 2016, kune kun amendopropono pri la unuopaj rubrikoj ene de la sekcio Movada Evoluigo. Ĝi akceptis ankaŭ la raporton kaj buĝeton por la fondaĵoj. Laŭ rekomendo sub ‘Komunumo’, la Komitato estonte ricevos la spezkontojn de okazintaj Universalaj Kongresoj.

La Kongresa Rezolucio estis akceptita, sub la kompreno ke povos okazi ankoraŭ vortumaj modifetoj.

Vortoj 300

Sekvas kelkaj fotoj pri aliaj partoj de la Kongreso. Fotis ĉiujn Marija Belošević



Kristin Tytgat, ŝlosila LKK-ano por ILEI en Ostendo diskutas kun Probal Daŝgupto, la antaŭa prezidanto de UEA.

Dekstre: s-ro Bernard Gnanadja el Benino (reprezentanto de la junularo tie) alparolas unu el la komitataj forumoj.




Renée Triolle en la Tago de Lernado marde.



La kongreseja enirejo, kun unu el centoj da afiŝoj tra la urbo.



La busto de Zamenhof antaŭ la ceremonio ĉe la stacidomo en Bulonjo, kie en 1905 Zamenhof kaj aliaj kongresanoj eltrajniĝis.



Dekstre: unu el multaj el la abundaj koncertoj tra la kongresa semajno. Anjo Amika kaj Perlo Miela el Hungario.



Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo.

Se vi volas vidi pli malnovajn komunikilojn iru al: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...